


# Eŭropa Bulteno

---

Januaro 2017, Numero 167

---

## ZAMENHOF – LA HOMO DE EPOKOJ



Mi tralegis la libron de Aleksander Korĵenkov „La vivo, verkoj kaj ideoj de doktoro L.L. Zamenhof“. Ege interesa libro, kiu traktas Zamenhofon nur laŭ la dokumentoj kaj do, donas vere tre objektivan aliron al lia agado kaj evoluo. Min aparte interesis lia filozofia penso kaj volis informiĝi pri hilelismo/homaranismo kion mi ĝis nun ne esence konis. Kaj mi do atingis jenajn konkludojn.

Zamenhof antaŭ la 20-a jarcento ĉefe dediĉis sin al Esperanto kaj interna ideo. Li mem ne sciis difini ĝin. Lia difino fine de lia vivo tekstis en enkonduko al la Deklaracio pri homaranismo en 1913 „...dum la esenco de Esperanto estas politike kaj religie absolute indiferenta kaj la interna esperantista ideo prezentas nur nedifinitan fratecon, senton kaj

esperon, kiujn ĉiu esperantisto havas plenan rajton ne sole komentarii al si tiel kiel li volas, sed eĉ ĝenerale akcepti aŭ ne akcepti ĝin,...

Pli malpli ekde 1900 li komencis intense okupiĝi pri io plia: ideologio kiu kondukus al lia baza celo, nome al kreo de socio kiu agados por unuiĝinta homaro. Tiu ideologio eliris el lia forta konvinko ke la bazo por humanismo estas starpunkto: „Agu al aliaj tiel kiel vi ŝatus ke aliaj agu al vi“, kion li atribuis al juda profeto Hilel. Pro tio li nomis sian konscian ideologian celaron la hilelismo. Tiu hilelismo evoluis de komenca ideo influi al judaro kaj helpi ilian problemon ĝis krei idean bazon por la komuneco kaj unueco de la homaro. Ĉar la hilelismon sufiĉe akre kontraŭstaris la esperantistoj, li ĝin iom pliĝeneraligis kaj nomis homaranismo. Esence oni povas diri ke li obsede ĝis sia vivofino volis krei movadon de homaranoj kiu celus unuecan homaron. Komence al tio ĉiam eslis ligita Esperanto: Homaranoj devus uzi neŭtrale homan lingvon en interpopola komunikado, kaj en la fina fazo, li tute ne plu menciis Esperanton. En sia juneco li starigis tezon ke la interpopolan (li ĉiam tion nomis „intergenta“) malamon kaŭzas manko de komuna lingvo kaj diverseco de religioj. Pro tio li longatempe ligis tion kune kaj batalis por Esperanto kaj serĉis solvon por unueca neŭtrala tuthomara religio. Lia homaranismo estis ĝuste tio: serĉo de homara neŭtrala religio kaj li ankaŭ daŭre parolis pri ties temploj.

Ambaŭ tiuj tezoj estas laŭ mi utopioj nerealismaj. La homara socia leĝaro enhavas la neprecon de mullingvismo kaj ne ekzistis homaro unulingva, nek ĝi estas ebla. Same pri religioj. Inkluzive de ateismo, kiu same estas religio kredanta ke klasika dio de religioj ne ekzistas, sed kredanta ke estas iuj naturaj fortoj.

Baze de tio oni povus konkludi ke li kreis ion kio estas malebla, kion cetere ankoraŭ nuntempe multaj neesperantistoj kredas. Tamen, ni bone scias ke sekvoj de lia agado kaj liaj ideoj estas tre realaj kaj signifaj en la mondo. La sekvo ne estas la lingvo mem, sed la ekzisto de la movado kiu similas al kiu ajn diaspora popolo. Li mem ne konsciis kaj pri tio fakte la esperantistoj ankaŭ nuntempe ne konscias ke tio kion li kreis estas perfekta ligo inter lingvo kaj ideologio. Tiu ligo ebligis ke nur Esperanto inter ĉiuj „artefaritaj“ lingvoj ekvivis. Li vane batalis por morte naskita monda religio, sed ne sciis ke li ĝin jam kreis samtempe kun la lingvo. La grandiozece de lia laboro ne estis nur intuicia bonega praktika lingva kodo, sed la ideologio kiun li intuicie esprimis en siaj komencaj poemoj. Li neniam konsideris tion, kion li esprimis en siaj poemoj, ideologio sed pensis ke tio estas komenco de esperanta poezio. Legu la Esperon, Al la fratoj, Preĝo sub verda standardo, La vojo, Mia penso, Al la esperantisto... temas pri tre klaraj programoemoj kaj kantoj. Ne hazarde esperantistoj kun entuziasmeo kantis la himnon kaj faras tion ankoraŭ nun kaj citis liajn poemojn ĉie kaj ĉiam. Tiel eblas klarigi ankaŭ la fenomenon de eternaj komencantoj. Esperantisto ne devas bonege koni la lingvon, sed li devas koni la sloganojn de liaj poemoj. Tiuj ideologiprogramaj tekstoj kreis la homgrupon kun komuna ideologio: la zamenhofa interna ideo, prezentita en deko da liaj poemoj. Lingvo estas lingvo nur tiam kiam ĝin uzas homgrupo ligita per komuna ideologio kaj kulturo. Pro tio ke ekde la komenco mem la lingvo estis ligita al socia programo (Ni riompos la murojn de miljaroj, kreos novan homaron...) Zamenhof ne konsciante kreis novan popolon kun celo kiu lin mem puŝis al insista kreado por forigi la malamojn intergentajn kaj kontribui al la monda paco. Li do ne konciis ke la ideologio, kiun li volis krei per siaj hilelismo/homaranismo jam ekzistis de la komenco: la interna ideo, difinita en la poemaro. Oni do povas konkludi: La grandioza atingo de Zamenhof estas popoloeto diaspora kiu per sia ideologio batalas kontraŭ malamo intergenta, preta je fordonado de sia lingvo al la mondo, kiam tiu estos preta akcepti ĝin. Li do ne kreis lingvon (tion faris miloj da

aliaj ankaŭ) sed homgrupon kun specifa celo kaj neŭtrala, facile lernebla kaj lingvistike genia lingvo.

Tiu grupo trairis multajn sociajn krizojn kiel la daŭran batalon kun homoj kiuj ĝin kontraŭis, la problemojn de batalo por pluekzisto en ekstremistaj reĝimoj kaj la krizojn ene de la propraj vicoj, kiel la ido-skismo kaj pluraj problemoj pro lingvoreformistoj. Intertempe tiu socio kreis rimarkindan kulturon, pri kiu ĝi mem povas fieri kaj plukredi pri la propra valoro.

La popoloj kiuj havas fortan kredon pri sia propra valoro ne malaperas, eĉ se ili troviĝas sub la plej teruraj perfortoj. Tial E-popolo plu ekuistas kaj ekzistos ankoraŭ longe.

Zlatko Tišljarić

## INTERNACIA TAGO DE GEPATRA LINGVO



Tradicie la Esperanto-movado festis la tagon de gepatraj lingvoj kaj profitis por informi pri Esperanto, kiu protektas la gepatrajn lingvojn. La tago estas festata la 21-an de februaro kaj ni invitas ĉiujn landajn asociojn organiza iun aranĝon dediĉitan al tiu tago.

Ĉi-jare la nacilingvaj versioj de la afiŝoj estas jam pretaj kaj elŝuteblaj:

<http://www.linguistic-rights.org/21-02-2017/>

Kaj elŝuteblas deko da nacilingvaj tradukoj de la tekstoj por ĵurnalistoj, kiun vi povas vidi en Esperanto ĉi tie:

<http://www.linguistic-rights.org/21-02-2017/21-a-de-februaro-Internacia-Tago-de-la-Gepatra-Lingvo.html>

La grupeto zpi de UEA

## ASEMBLEO DE EEU EN FREIBURG DUM LA GEAKONGRESO

La kunsido de la ĉi-jara asembleo de EEU okazos dum la Germana E-kongreso en Freiburg inter la 2-a kaj 6-a de junio 2017. Ĉar dum la asembleo okazos ankaŭ elektoj por la nova estraro, la landaj asocioj devas ĝis la fino de februaro aŭ konfirmi aŭ proponi novan personon el sia lando kiu iĝos asembleano dum la tri sekvaj jaroj. Tiuj novaj asembleanoj estos invitataj al la kunsido kaj ili elektos la estraron. Ni petas la landajn asociojn dum februaro elekti siajn novajn aŭ konfirmi la malnovajn asembleanojn kaj informi la sekretarion pri tio.

D-ro Seán Ó Riain, prezidanto de EEU

## KOMENCO DE ZAMENHOFA JARO EN HISPANIO

Jen informoj pri la komenco de la festado de la Jaro Zamenhof en Hispanio.

<http://www.esperanto.es/hef/index.php/komenco/38-noticias-esperanto/noticia/333-komencigas-la-jaro-zamenhof-en-hispanio>

Dum tiuj ĉi tagoj montriĝas en Madrido ekspozicio pri Esperanto, kunlabore kun la Pola Instituto pri Kulturo, en Publika Biblioteko de la kvartalo Vallecas, kie situas la t.n. Centro de Pola Kulturintereso de Madrido (loko por elmontrado de la kulturo de la komunumoj de enmigrintoj en la regiono). La ekspozicio estas vizitebla de la 20a de januaro ĝis la 10a de februaro. La 9an de februaro, estas programata prezentado de la Jaro Zamenhof, kun gvidata vizito al la ekspozicio. La ekspozicio estis jam montrita dum tiu ĉi monato januaro ankaŭ en Valencio.

La 2an de februaro, la prezidanto de la Federacio, prelegos pri D-ro Zamenhof, lia verkaro kaj ideoj, en la Centro Sefarad-Israel, institucio kreita de la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj por flegi la rilatojn kun la juda kulturo. Ĝia sidejo troviĝas en historia palaco en la strato Mayor de Madrido. La prelego evidente donos specialan atenton al la juda fono de la laboro de D-ro Zamenhof.

José Antonio del Barrio

## KROATIA TELEVIDO PRI ESPERANTO KAJ ZAMENHOF

London, la 23-an de januaro Kroatia televido filmis specialan raportaĵon pri Esperanto kaj Zamenhof en la ejoj de Kroata Esperanto-Ligo. Intervjuitaj estis prezidanto de KEL Anto Mlinar, vicprezidantino de KEL Judita Rey Hudeček kaj sekretario de EEU, Zlatko Tišljar. La elsendo daŭras 5-minutojn.

Judita Rey Hudeček

## EN BRATISLAVO RENKONTIĜOS POLIGLOTOJ

De 31.5. ĝis 4.6.2017 en Bratislava, Slovakio okazos "Poliglota renkontiĝo" (Polyglot Gathering 2017). Temas pri verŝajne tutmonde plej granda (kaj plej longa) evento por plurlingvemuloj. Des pli interesa estas la fakto, ke ĝin ekis organizi tri esperantistoj en Berlino (en 2015 okazis la unua) kaj malgraŭ ke la evento uzas ĉefe la anglan kiel diskutlingvon, oni sukcesis tre taŭga enigi plurajn erojn de la Esperanto-kulturo kaj komunumo al tiu ĉi evento. Do vi povas dum ĝi renkonti ekz. Gufujon, Aligatorejon (jes, kun tiaj nomoj :), aŭ ĝui (multlingvan) koncerton de jOmO!

Krome, ĉ. 25-30% de la partoprenantoj parolas ankaŭ Esperanton - tre bona rezulto, konsiderante ke la evento celas plurlingvemulojn ĝenerale. Granda pluso estas, ke tiu ĉi evento kapablas plurajn poliglotojn venigi al Esperanto aŭ konvinki ilin lerni ĝin (kiel sian sekvan lingvon :).

Ĉi-jare la evento post 3-fojoj en Berlino do unuan fojon okazos en Bratislava organizata ĉefe de la E@I-teamo kaj slovaka poliglotino Lýdia Machová, kiu ankaŭ pri la temo de efika lingvo-instruado prelegis eĉ 2-foje dum la 101-a UK en Nitro.

Dekano de la Fakultato de Aplikitaj Lingvoj de la Ekonomia universitato, kie la evento okazos mem estas politologo kaj okupiĝas ankaŭ pri lingva politiko. Ankaŭ tial estas plano jaŭde, la 1an de junio okazigi tuttagan serion de la lingvopolitikaj prelegoj dum la Poliglota renkontiĝo. Ĉar evidentiĝas, ke tiu ĉi temo estas nesufiĉe konata eĉ al la plurlingvemuloj, kaj post Brireliro ĝi iĝis eĉ pli aktuala temo ankaŭ ene de EU. Do oni ne nur parolos pri lingvoj kaj ilia lernado, sed ankaŭ pri diversaj lingvopolitikoj en la mondo, kompreneble ankaŭ informante pri Esperanto kaj ties ebla rolo.

Krom tiu ĉi evento E@I kunlabore kun la Fakultato de aplikitaj lingvoj de la sama universitato pretigas okazigi apartan lingvopolitikan konferencon por septembro (21.9.2017), tagon antaŭ la lingva festivalo (kiun ni organizas en la samaj ejoj). Detaloj pri tiu ĉi evento aperos en la sekva numero de EB. En la poliglota konferenco partoprenos per prelego ankaŭ nia prezidanto dro Seán Ó Riain.

Detaloj troveblas (angle) en: [www.polyglotbratislava.com](http://www.polyglotbratislava.com) (baldaŭ aperos ankaŭ resuma informpaĝo en la slovaka kaj Esperanto tie).

Peter Baláž

## **KLERIGOFERTOJ EN HERZBERG AM HARZ (GERMAIO) EN 2017**



De preskaŭ dudek jaroj la Esperanto-Centro en Herzberg servas konstante por multflanka klerigado, krom diversnivela lingvokursoj specialan atenton ni donas al instrukapligado, metodika trejnado kaj helpo al aktivuloj por orientiĝi en la Esperantomovado kaj esti pretaj je informado, varbado kaj aliaj praktikaj movadaj taskoj.

Kelkaj gravaj datoj el la klerigprogramo en 2017:

1) 24-26.02.2017: 77a Studsesio: Esperanto & Medicino, oficiala kurso pri Unua Helpo far Frank Lappe; kun UMEA-prezidanto D-ro Christoph Klawe, studado de fakgazetoj kaj libroj el la biblioteko de Interkultura Centro Herzberg rilate al medicino kaj Esperanto

2) 07-09.04.2017: 78a Studsesio, modulo pri historio, literaturo, multe pri Zamenhof, la familio, komparoj de la tiama tempo kaj nuntempo

3) 16-18.06.2017: Staĝ-semajnfino: ordigo, katalogado, skanado, faklaborado en la Esperanto-biblioteko kaj arkivo. Helpo bezonata!

Volontuloj, interesiĝantoj, lernemuloj bonvolu anonci sin ĉe: [zsofia.korody@esperanto.de](mailto:zsofia.korody@esperanto.de)



4) 29.09-03.10.2017: TORPEDO 12 (Pedagogiaj Tagoj kun AGEI). Modernaj instrumentoj, didaktiko, instrukapabligo; 79a GEA-Studsesio: modulo pri metodiko, instruprogramoj, lernplatformoj. Seminario de Erasmus+ projekto

5) 08-10.12.2017: 80a Studsesio: modulo pri Esperanto-literaturo kaj specifa Esperanto-kulturo, movada organizado, informado, varbado

Kelkaj kursofertoj de Interkultura Centro Herzberg en 2017: Esperanto lingvokursoj (A1 - C1) por komencantoj, progresintoj, konversaciemuloj

17-19.03.2017: Semajnfinaj Esperanto-Kursoj en pluraj niveloj (ankaŭ kiel popolaltlerneja VHS-kurso)

09-18.07.2017: SEP – Semajnoj de Esperanto-Perfektigo. Intensaj lingvokursoj por familioj, infanoj, junuloj, plenkreskuloj; kulturaj kaj turismaj kromprogramoj. Staĝado kun observeblo de lecionoj de spertaj instruistoj, instrupraktiko por instruemuloj.

AGEI kaj GEA-membroj ricevas ĝis 50% rabaton, GEJ-membroj povas peti 100%-an subvencion kaj repagon de veturkostoj.

Ni rekomendas regulan partoprenon en la klerigsesioj, prelegserioj, sed eĉ unuopaj studmoduloj helpas al faka kleriĝo. Akiru atestilon!

Gvidantoj: Peter Zilvar, Zsófia Kóródy kaj fakprelegantoj

Zsófia Kóródy

## PLANOJ DE KULTURCENTRO KVINPETALO (FRANCIO)



La kulturcentron Kvinpetalo en Bouresse (proksime de Poitiers) proponas staĝojn de diversaj niveloj, por pliprofundigi vian konon de Esperanto, en agrabla kaj trankvila vilaĝo. Vi povas pretiĝi al la ekzamenoj de FEI, aŭ simple ĝui aktivigajn kursojn en bona etoso.

13a-17a de februaro: februara staĝo, pluraj niveloj (komencantoj, komencintoj, progresintoj).

Gvidanto: Ansofi Markov

Ebleco je ekzamenoj de FEI sabate la 18an de februaro.

3a-7a de aprilo, staĝo pri tradukado, kun Brian Moon

Tradukadon necesas aparte ekzerci, kaj dum tiu ĉi semajno ni faros ĝuste tion, esperantigante francajn tekstojn plej diversajn.

La celo estas tradukado altnivela, sed ankaŭ plibonigo de la lingva nivelo en Esperanto, ĉar analizi tradukproblemojn povas konduki ankaŭ al lingvolecionoj. Partoprenantoj de diversaj lingvoniveloj estos do bonvenaj (taŭgas ankaŭ por por preparo al atesto pri supera lernado).

Staĝo por trejnado de instruistoj, kun Katalin Kováts, de la 10a ĝis la 14a de aprilo (semajno antaŭ Pasko). 5-taga seminario celanta pripensi kaj praktike prepari intervenojn enkadre de TAP/NAP en la elementaj lernejoj, kaj atelierojn en gimnazioj kaj liceoj.

Promeni tra naturo kaj Vikipedio kun Alain Favre, 12a-16a de junio.

Tiu staĝo havos du aspektojn: Ni promenos en naturo kaj malkovros speciojn de vivuloj: plantoj, fungoj, bestoj, kaj ankaŭ interesajn mediojn. Ni verkos artikolojn por Vikipedio pri la sama temo, studante la jam ekzistantajn – kiujn eventuale oni ankaŭ provos plibonigi. Bonvenon en Kvinpetalo!

Claude Nourmont

## PREZENTO DE UNUA LITERATURA LIBRO DE SPOMENKA ŜTIMEC EN LA KROATA LINGVO



La 27-an de januaro konata verkistino de esperanta literaturo Spomenka Ŝtimec, kiu en Esperanto aperigis jam pli ol 10 librojn, inter kiuj pluraj estis el Esperanto tradukitaj el diversaj mondaj lingvoj, la unuan fojon aperigis libron en la kroata lingvo. Temas pri kelkaj originalaj tekstoj (ĉefe rakontoj) kaj la plej multaj estas priverkitaj laŭ la jam aperintaj prozaĵoj. Per tiu ĉi libro Spomenka estas prezentata al la kroata publiko. La titolo de la libro estas Dom u srednjoj Europi (Hejmo en Mezeŭropo) kaj ĝin eldonis Hrvatsko-zagorsko književno društvo kaj E-societo

Trixini. Pri la libro parolis Božidar Brezinščak Bagola nome de la eldonisto, Judita Rey Hudeček kaj Jasminka Domaš. La solena prezento okazis en urba zagreba biblioteko »Bogdan Ogrizović«. Kuriozaĵo, kiun ni eksciis dum la prezento:

Spomenka Ŝtimec estas la plej tradukata verkistino el Kroatio al la japana lingvo (aperis 5 ŝiaj verkoj en la japana lingvo).

Zlatko Tišljar

## DIO FINE REMEMORIS PRI LA PATRO DE PINJINO

Zhou Younguang revenis el Novjorko al Ŝangajo en 1949 estante konvinkita ke nun fine Ĉinio ekevoluos kaj li volis helpi ĝin en tio. Li estis tre konata ekonomikisto.

Ĉar Zhou estis ankaŭ amatora lingvisto kaj studis Esperanton, kaj li estis konvinkita ke ĝi povus fariĝi lingvo de la tuta homaro, la centra registaro de Ĉinio taskigis lin en 1955 por reformi la ĉinan hieroglifan skribon cele al ebligo plialfabetigi la popolon (tiutempe 80% da homoj estis analfabetaj). La rezulto de tiu tasko estis latina maniero skribi la ĉinan, t.n. pinjino. Kaj tio estas ankoraŭ nun la latina skribo de la ĉina, do, grava helpo al ĉina popolo

kaj ankaŭ al neĉinoj kiuj lernas la ĉinan. Dum la kultura revolucio li estis sendita al punaloro al kamparo kie li pasigis dekon da jaroj.



*Zhou Youguang mortis en sia 112-a jaro.*

Kiam li estis jam tre maljuna, li sprite deklaris ke Dio forgesis lin. Nun fine Dio rememoris lin en la 112-a jaro. Pri lia vivo ne to multaj medioj parolis en Ĉinio, ĉar li ĝis la vivofino daŭre kritikis la komunisman sistemon.

Resumis Zlatko Tišljar laŭ la artikolo de Zorana Baković en slovena ĵurnalo »Delo«  
<http://www.delo.si/nedelo/bog-se-je-spomnil-oceta-pinjina.html>

### **Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.**

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 31-an de januaro 2017

Redaktoro: Zlatko Tišljar

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljar, Seán Ó Riain, Zsofia Korody, Petro Balaž, Claude Nourmont, Judita Rey Hudeček, José Antonio del Barrio

Kontakto: ztisljar (ĉe) gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

